# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-07 sendita el Budapeŝto la 15an de febuaro. Kontrolo el Benino.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Solidaru kun Afriko – aliĝu al ret-renkontiĝo

Okazos virtuala renkontiĝo de afrikaj esperantistoj kadre de la Semajno de Internacia Amikeco sabate, la 27-an de februaro 2021. La renkontiĝo disvolviĝos inter la 11-a kaj 14 horoj per ZOOM (laŭ UTC). Oni ion scios pli pri afrikaj esperantistoj, movado en unuopaj landoj, perspektivoj de la enkontinenta movado. Estos ludoj, spektaĵoj kaj ankaŭ babiladoj pri la celebrata temo. Vidu foton en la sekva paĝo pri la reta agado de kluboj kaj grupoj tra la kontinento.

La programo ankoraŭ ne finkonstruiĝis. Ni bonvenigas kontribuoproponon de ĉiuj, kiuj ŝatus ion ajn prezenti dum la renkontiĝo. Ĉiuj estas invitataj amikumi kun Afriko! La aliĝo estas senpaga kaj partopreno al la aranĝo estas malfermita ankaŭ al esperantistoj de aliaj mondpartoj. Bonvolu diskonigi la informon al viaj klubanoj, landanoj kaj instigi ilin noti la daton, por kuncelebri kun Afriko en senlima etoso la Semajnon de la Internacia Amikeco.

La informoj pri la aliro kaj aliĝilo estas alireblaj en *Eventa Servo de UEA.* Ni faras tion laŭ rekomendo de Yves Nevelsteen en Belgio, ke alirinformoj aperu tie, kie ili estas aktualigebaj en kazoj de modifoj.

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

Redaktoroj: Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



**ENHAVO**


- Afriko amikas
- Nova Afrika Komisiono
- Fondaĵo Canuto
- Subvenciebloj en Eŭropo.

# Afrika Komisiono (AK) havas novan konsiston

Post pluraj monatoj sen kunordiganto en la Afrika Komisiono, la Estraro de UEA aprobis la elekton de D-ro Elisee Byelongo por kunordigi ĝin.

D-ro BYELONGO Elisee ISHELOKE naskiĝis en Demokratia Respubliko Kongo (li estas konata en Esperantujo sub la nomo-formo Elisee Byelongo I.S). Tie li vivis kelkajn jarojn antaŭ ol migri al eksterlando, precipe Burundo, Tanzanio kaj Sud-Afriko (Durbano kaj Kab-urbo). Elisée travivis la kongolandan militon, kiu startis en lia naskiĝurbo en Uvira (Sud-Kivuo) en oktobro 1996 kaj la batalon en Burundo en 1993. Pri tio li rakontas en sia libro "Eĥoj el Bembujo : tradicio, rilatoj kun Banjamulengo, la genezo de la milito en DR Kongo kaj la diasporo rilate al Esperanto", havebla ĉe UEA. Elisée ankaŭ verkis en sia fako librojn kaj artikolojn, kaj originale en Esperanto alian libron: "Historio de la Esperanto-movado en Sud-Afriko kaj ties periferioj, omaĝe al Axel von Blottnitz".

Li esperantiĝis en 1993 lerninte de Mateso Bilimba unue kaj poste per korespondado (kurso Ferez) kun Hans Bakker ĝis diplomiĝo pri Esperanto. Li kreis la "Klubon de la Paco kaj Frateco" (KLUPAF) por instrui al centoj da rifuĝintoj Esperanton en Nyarugusu-Tendaro inter 1996 kaj 1998 en Tanzanio. Li, aldone, entreprenis instali klubon de Esperanto en Najrobio, Kenjo. Li havas multajn jarojn de sperto kiel instruisto, pastoro, verkanto kaj fakulo.

En 2018 li doktoriĝis pri manaĝerado kun specialiĝo en administrado kaj nun laboras kiel esploristo ĉe la Universitato de Kab-urbo. Antaŭ lia doktoriĝo li ricevis magistran gradon en administrado kaj licencion en komerca manaĝerado. Li edziĝis al Elizabeth, kun kiu li havas 4 infanojn. Nun, li estas la vic-prezidanto de Esperanto-Asocio de Sud-Afriko (EASA), ano de la laborgrupo "Esperanto en la Universitatoj", kunordiganto de la agado "Esperanto en BRICS-landaro" kaj ekde, februaro 2021, de la Afrika Komisiono de UEA (https://www.esperanto-afriko.org/afrikakomisiono.htm).



Afrikanoj adaptiĝas al la pandemio per sekvado de la limigaj reguloj, kaj estas en kontakto unu kun la alia. Krome, ili aŭdigas sian voĉon por aliaj landoj, kiel tuj okazos por la festado de la Semajno pri Amikeco 2021.

La nova kunordiganto havas ĉefajn taskojn serĉi rimedojn kaj strategiojn por bone funkciigi la komisionon, reaktivigi la komisionon, esti en rilatoj kun landaj asocioj kaj individuoj kaj cetere krei Esperanto-klubojn en landoj kie ankoraŭ ne troviĝas esperantistoj.

Nun, la Afrika komisiono de UEA konsistas el:

1. D-ro BYELONGO Elisee ISHELOKE, Sud-Afriko: Kunordiganto
2. Gilbert NIYUKURI, Burundo: Vic-kunordiganto, Turismo, AKE, Sporto.
3. Joel N. MUHIRE, DR Kongo: Sekretario, Junulara Agado, Protokolado.
4. Cedrick IRAKOZE, Kenjo: Informado, reklamado en sociaj retejoj.
5. Adjévi ADJE, Togolando: Afrika bulteno, Kulturo.
6. Opa Moses GBETOGO, Niĝerio: Rilatoj kun publikaj instancoj.
7. S-ino Miora RAVELOHARISON, Madagaskaro: Virina Agado.
8. Viktor NTO NTO, Kameruno: Instruado, revigligo de lokaj E-kluboj




La mapo montras, ke la komisionanoj estas bone distribuitaj tra la kontinento. Memoru, ke la nordaj landoj de la kontinento apartenas al la regiono MONA. La Afrika Komisiono respondecas pri sub-sahara Afriko. Ni dankas al Mirejo Grosjean pro la livero de la Eo-lingva mapobazo.

# Fondaĵo Canuto en 2020 – jara raporto

Tiu fondaĵo subtenas membrigojn al UEA el landoj kun limigitaj financaj rimedoj. La laŭdinda reformo de la kotizaj strukturoj al nova 5-ŝtupa modelo bonvenas, sed ne sufiĉas. Nun la baro estas transpagipovo, nur ege lertaj homoj trovas vojojn transigi etajn sumojn sen groteskaj kostoj. Tial restas bezono por Fondaĵo Canuto (FC).

Jen la finsumoj por FC por 2020 (492 entute – la celo de 500 preskaŭ atingita).

**Afriko (subsahara) 25 landoj, 140 membroj (68 junaj – 49%):** Angolo 2, Benino 21 (15 junaj), Burkino 1 (junulo), Burundo 9 (6 junaj), Centrafrika Resp. 1 (juna), Ĉado 3, Centra Afrika Resp. 1 (junulo), Ebur-Bordo 3 (1 juna), Etiopio 2 (1 juna), Ganao 3 (1 juna), Gvineo 1 (juna) Kameruno 4, Kenjo 4 (2 junaj), Komoroj 2, Kongo DR 39 (26 junaj), Madagaskaro 4, Malio 2 (1 juna), Niĝero 2, Niĝerio 1, Ruando 2 (1 juna), Senegalo 9 (6 junaj), Sud-Afriko 2, Tanzanio 7 (1 juna), Togolando 16 (3 junaj), Zambio 1.

**Ameriko: 12 landoj, 85 membroj (35 junaj – 41%):** Argentino 7 (2 junaj), Bolivio 1 (juna), Brazilo 23 (21 junaj), Ĉilio 2, Gvatemalo 2, Honduro 1, Kolombio 6 (1 juna), Kubo 23 (3 junaj), Meksiko 12 (2 junaj), Nikaragvo 2 (1 juna), Peruo 4 (3 junaj), Venezuelo 2 (1 juna).

**Azio:** **17 landoj, 139 membroj (57 junaj – 41%):** Ĉinio 2 (1 juna), Filipinoj 16 (16 junaj), Hinda Unio (Barato) 7 (4 junaj), Indonezio 9 (8 junaj), Irano 12 (1 juna), Israelo 12 (1 juna), Japanio 1, Kamboĝo 2, Kazaĥio 2, Mongolio 9 (2 junaj), Nepalo 12 (8 junaj), Orienta Timoro 3 (3 junaj), Pakistano 30 (6 junaj), Taĝikio 1,Tajlando 1 (junulo), Uzbekio 6 (1 juna). Vjetnamio 16 (5 junaj).

**Eŭropo:** **13 landoj, 89 membroj (8 junaj – 9%):** Albanio 11, Belorusio 2 (1 juna), Bosnio-Hercegovino 10, Britio 3 (2 junaj), Bulgario 12, Francio 2 (1 juna), Germanio 1, Hispanio 1, Makedonio 2, Rumanio 13 (1 juna), Rusio 10 , Serbio 11 (1 juna), Ukrainio 11 (2 junaj). La maldekstra foto: subteninda movado en Rumanio. Fotoj: SMG




Serhej Prudko – revivigo en Ukrainio



**MONA:** **7 landoj, 28 membroj (11 junaj – 39%):** Alĝerio 3 (1 juna) Armenio 6 (1 juna), Kartvelio 2, Maroko 4 (3 junaj), Palestino 1, Tunizio 3, Turkio 9 (6 junaj).

Ni tre intence volas uzi la Fondaĵon por membrigi junulojn kaj virinojn (cito el raporto 2019). La rezultoj klare montras, ke la altiro de junaj FC-membroj bone sukcesas. TEJO kun aparta vervo varbas kaj anoncas multajn pliajn membrojn, kiuj ne bezonas subtenon de FC – tio ĉefe okazas tra Latinameriko.

La ciferoj kiel raportitaj de la reta oficejo de UEA – malgrandaj modifoj malverŝajnaj, sed povos okazi. La donacintoj al la Fondaĵo ricevis ĉi tiun raporton, kune kun dankesprimo.

Ni nun frontas la defion, kiel mildigi la transpagajn barojn. Sed pri tio en estonta EKO-komuniko.

SMG, respondeculo pri FC por UEA

# De ideo al agado

***Kiel realigi vian strategian vizion per konkretaj agadoj, kadre de projektoj subvenciitaj de Eŭropa Unio.***

Ĉu vi iam havis - aŭ nuntempe havas - ideojn, kiujn vi volus realigi kadre de via Landa aŭ Faka Asocio, sed la ideoj neniel kreskis pro manko de financado aŭ de konkreta plano? Ĉu vi volus prezenti al la institucioj, kion oni atingas pere de Esperanto? Ĉu vi

ŝatus informiĝi pri subvenciebloj kadre de la nova sepjara programo Erasmus, la posteulo de Erasmus+?

Ni invitas vin al kunsido organizata de Kosmo, kun kiu UEA kontraktis por helpi financi projektojn, kiel ekzemple trejnadojn, internaciajn agadojn ligontajn diversajn landajn kaj lokajn asociojn tiel plenumante komitatan decidon plu progresi en tiu ĉi grava fako pri organiza evoluado. Vi bonvenas partopreni en interaktiva sesio, **la 20-an de februaro, je 18:00 UTC**, dum kiu eblos kunpridiskuti la avantaĝojn kaj oportunojn, kiujn via Asocio povas ricevi danke al EU-subvenciitaj projektoj.






Praktika ricevinto de financa subteno de Eŭropaj instancoj: AMO-seminario 35 en 2017 en la svisa urbeto Les Brenets, kun internacia publiko kaj aparte forta partopreno de danoj, kiu prizorgis la prezenton de projekto inda je subteno. Foto: SMG

Dum la sesio vi ekscios pri sukcesaj spertoj de aliaj organizoj, kiuj jam realigis projektojn danke al la financa subteno de EU. Vi ankaŭ povos starigi demandojn, informiĝi pri subvenciebloj, interŝanĝi ideojn kaj tiel pli konkrete imagi kiel ankaŭ via Esperanto-organizo povus pluevolui danke al similaj projektoj.

Se vi interesiĝas, bonvolu plenigi la aliĝilon **ĝis la 18-a de februaro**:
http://bit.ly/projektoj - ju pli frue, des pli bone, por taŭge aranĝi la eventon!

Aleks Kadar, Ĝenerala Sekretario de UEA kaj estrarano respondeca pri Eŭropo
Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de UEA kaj estrarano respondeca pri Landa Agado
Francesco Maurelli, direktoro de Kosmo Strategio

========= vortoj: 1400 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.